# Tempo por renovigi la promeson de Eŭropo

Voĉdono por la Verduloj estas voĉdono por ŝanĝo. Ĝi estas voĉdono por ne lasi Eŭropon perdiĝi, sed por fari ĝin tia, kia ĝi estis promesita: unio ne de egoismaj interesoj, sed de kundividita respondeco; unio ne por financaj gajnoj por malmultaj, sed por ekonomia kaj socia progreso por ĉiuj, unio, kiu gvidas la mondon, protektante homojn kaj la planedon.

Nun estas tempo por plenumi tiun promeson. Nun estas tempo por ŝanĝi.

Ni estas vere eŭropa movado unuigita per nia vizio, misio kaj pasio. De Irlando ĝis Kartvelujo, de Norvegujo ĝis Malto ni batalas por homa digno, daŭrigeblo, egalrajteco, paco kaj solidareco. Tion ni faras en la parlamentoj kaj sur la stratoj.

Sed hodiaŭ potencaj fortoj provas stiri nin malantaŭen. Unuflanke novaj grupoj uzas agresajn taktikojn kaj la tenton de malamo por altrudi sian manieron por akiri la povon. Aliflanke politikistoj emantaj daŭrigi la ĝisnunan aferstaton malsukcesas realigi veran ŝanĝon en tempo, kiu postulas ambician agadon.

Unuiĝinta Reĝlando decidis forlasi la Union, kaj aliaj fortoj volas malfortigi ĝin. Aŭtoritatismo, rasismo, novliberalismo, terurismo kaj militoj en najbaraj regionoj – ĉiuj malsammaniere – malpliigis la sekurecosenton ĉe multaj eŭropanoj.

La financa krizo kaj elspezreduktaj politikoj lasis milionojn en malriĉeco, dum grandaj plurnaciaj korporacioj evitas impostojn. Homoj fuĝantaj for de militoj kaj persekutoj vidigis registarojn ne volantajn helpi, dum Eŭropo kiel tuto estas pli riĉa ol iam ajn. La klimata krizo minacas rapide malfari la fundamentojn de nia civilizacio.

La estonteco de Eŭropo estas en danĝero. Nun estas ĝi estas tempo por ŝanĝo.

Nun, pli ol iam ajn, ni bezonas agi. Ni bezonas konstrui demokratian kaj inkluzivan Eŭropon, kiu estas sociale justa kaj daŭrigebla por la medio. Ni bezonas ekonomion, kiu servas kaj la nunajn kaj la estontajn generaciojn. Ni bezonas Eŭropon, kiu prenas sur sin sian tutmondan respondecon kaj malatentas neniun.

En la nuna tutiĝinta mondo neniu lando estas sufiĉe granda por sole aliri problemojn. Ni povas repreni la estradon nur per kunlaborado kaj rigardo al la estonteco, ne per konstruado de muroj kaj retiriĝo en la estintecon. Ni estas gvidataj de la Celoj por Daŭrigebla Evoluigo, kiuj provizas gvidilon al ĉiuj landoj.

La Eŭropa Unio estas tute ne perfekta, sed ĝi povas esti potenca forto por la bono. Ni povas plukonstrui sur tio, kio estas atingita - kaj ŝanĝi tion, kio ne funkciis. Kunlaborante, Eŭropo povas redukti la malriĉecon kaj krei laborpostenojn, alfronti la klimatan krizon kaj ripari nian naturon, kontraŭi diskriminacion kaj defendi liberecon.

Ni scias, ke la konstruado de tia Eŭropo ne facilos. Malnovaj partioj emantaj daŭrigi la estintan aferstaton longe rezistis al alvokoj por progresaj reformoj. Sed ni devigis nin ĉiutage diligente labori kun homoj, organizaĵoj kaj movadoj strebantaj al ŝanĝoj tra la kontinento, subtenataj de kreskanta nombro de eŭropanoj. La estonteco estas VERDA.

Tra la jaroj nia persista laboro rezultigis multajn sukcesojn. Kun la verduloj, kiuj ludis gravan rolon, Eŭropo antaŭeniris por investi en renovigeblan energion, en sekuran retan privatecon de la homoj, en pliigon de reutiligado kaj en la malpermesadon de malutilaj pesticidoj. Danke al la Verdula gvidado Eŭropo antaŭeniras en la protektado de denuncantoj, kiuj publikigas informon pri publika interesiĝo, en agado kontraŭ aŭtoritatismaj registaroj, en malpermesado de nenecesaj plastaĵoj kaj en la batalado kontraŭ impostevitado de grandaj korporacioj – por doni nur kelkajn ekzemplojn.

Voĉdono por la Verduloj rezultigas veran diferencon. Sed multo restas farenda.

Ni volas Eŭropon, en kiu junuloj ne plu devu penegi por trovi taŭgan laborpostenon; virinoj ne estu diskriminaciataj ĉe la laboro; kaj posedantoj de malgrandaj entreprenoj ne suferu pro maljusta imposta konkurenco de grandaj korporacioj. En kiu gepatroj ne maltrankviliĝu pri siaj infanoj pro elmeto al malutilaj kemiaĵoj; ĵurnalistoj pri silentigo fare de potencaj profitantoj; kaj transseksuloj pri surstrata perforto. En kiu maljunuloj ne vivu en ekstrema malriĉeco; kaj homoj ne dronu en Mediteraneo. En kiu bestoj ne plu estu mistraktataj en industrioj; en kiu malnovaj arbaroj ne estu senarbigataj por mallongdaŭra profito.

Sed ni ne kapablas fari tion sole. Aliĝu al ni por kundividi nian pasion por justa kaj daŭrigebla estonteco.

Estas  tempo por renovigi la promeson de Eŭropo.

**Heredigi puran kaj sekuran planedon al infanoj kaj junularo**

*Ni volas, ke Eŭropo konduku la mondon en justan transiron al daŭrigeblaj socioj. Verdigi nian ekonomion estas historia oportuno por krei laborpostenojn kaj plibonigi nian vivokvaliton, samtempe certigante, ke neniu estu postlasita. Klimata krizo, detruo de naturo kaj troa uzado de rimedoj minacas la fundamentojn de nia bonfarto kaj riĉeco – eĉ nian sekurecon. Homa progreso eblas nur ene de la planedaj limoj.*

La daŭrigeblo de la medio ne estas lukso, ĝi estas neceso. Kun malpliiĝanta biologia diverseco, malpurigita aero kaj plirapidiĝanta klimata krizo Eŭropo  faru pli multe, pli rapide, tra ĉiuj politikaj kampoj. Ni havas la devon konservi la medion – kaj hodiaŭ por la nunaj homoj kaj morgaŭ por niaj infanoj. Ni certigu reprezentiĝon al ĉiuj, kiuj heredos la planedon.

**Porklimata agado.** Eŭropo montru la vojon al porklimata agado, plenumante la Parizan Akordon. Ni volas, ke EU daŭrigu ĉiujn eblajn strebojn por limigi la temperaturaltiĝon ĝis 1,5 gradoj super la antaŭindustriaj niveloj. Ni alvokas por eŭropa klimatleĝo kun devigaj karbonbuĝetoj, kiuj minimume 55-procente reduktu eligojn ĝis 2030 kaj por ekonomio, en kiu la neta eligo estu neniom. Tio inkluzivu restaŭradon de naturaj sorbiloj en arbaroj kaj grundoj.

Por montri gvidemon Eŭropo bezonas pliigi internacian klimatofondaĵon. Se ŝlosillandoj ekster EU rifuzas limigi la eligojn, eblas instali limimpostajn alĝustigojn por certigi niveligan kampon por eŭropaj laboristoj kaj kompanioj. Ni volas fortan minimuman prezon en la negoca sistemo pri eligoj.

**Energio.**

Eĉ ne unu eŭro de impostopagantoj financu fosiliajn brulaĵojn. Investaĵoj de fosilia energio reinvesteblas en daŭrigeblaj solvoj, kiaj energia efikeco, landlimtransiraj trajnoj kaj daŭrigebla terkultivado.

Por plenumi la porklimatajn celojn Eŭropo ĉesigu la uzadon de karbo ĝis 2030 kaj de aliaj fosiliaj brulaĵoj, inkluzive de gaso; laŭeble plej baldaŭ poste. Atomenergio kaj hidraŭlika fendado ne ludu rolon en estonteco de pura energiproduktado.

Ni volas antaŭrangecon de energia efikeco kaj energiŝparado, dume alfrontante energimalriĉecon. Se ĝi estas bone efektivigata, la energitransiro al centelcente renovigebla energio ĉesigos la polucion, kreos laborpostenojn kaj pliigos nian energisendependecon – samtempe kuraĝigante civitanojn ludi pli aktivan rolon.

**Transporto.** La konstruado de daŭrigebla transportsistemo postulas investadon en fervojoj kiuj interligos eŭropajn landojn kaj regionojn per pli alireblaj kaj malmultekostaj trajnoj, inkluzive de rapidaj kaj noktaj trajnoj. Pli taŭga publika transporto kaj redukto de la neceso transporti povas solvi trafikŝtopiĝojn kaj poluadon ĉie tra Eŭropo. Eblas parte ŝanĝi vartransportadon al fervojoj aŭ ekzistantaj akvokanaloj, se tio rezultigas neniun plian malutilon al la medio. Ĉiuj kamionoj, liveraŭtoj, trajnoj, ŝipoj kaj aviadiloj post iom da tempo iĝu neniom eligantaj veturiloj.

Financado de daŭrigebla transporto povas esti deturnata de subvencioj por flugtransporto per enkonduko de eŭropa flugimposto, eŭropa aldonvalora imposto pri flugbiletoj kaj samtempe per ĉesigo de la escepto pri kerosenimposto por aviadiloj, subtenante forajn areojn, kiaj insuloj kun neniu alia transporteblo. Imposti flugajn kaj survojajn transportojn laŭ la principo, ke poluanto pagu, ebenigus la ludokampon inter transportsistemoj.

Neniu nova fosilibrulaĵa aŭto estu vendata en Eŭropo post 2030. La Unio devus subteni la kreadon de malmulteligaj zonoj en urboj kaj urbegoj en tuta Eŭropo kaj antaŭenigi bicikladon kaj piediradon. Por ludi rolon biologiaj brulaĵoj havu malaltan karbonan spuron kaj ne konkurencu kun nutraĵproduktado nek malutilu al biologia diverseco.

**Naturmedio kaj naturprotektado.** Persista agado pri la naturmedio povas plibonigi la vivon de milionoj da eŭropanoj. Hodiaŭ la aerpoluado sole kaŭzas ĉiujare pli ol 400 mil fruajn mortojn en EU – kaj subfosas la vivokvaliton de pliaj milionoj.

Pliseverigo de la limoj pri poluado protektas la aeron, kiun ni enspiras. Ŝanĝo al daŭrigebla terkultivado igas la akvon, kiun ni trinkas, pli pura. Malpermesi danĝerajn kemiaĵojn helpas preventi sanproblemojn. Puraj solvoj havas rapide kreskantan tutmondan merkaton, kreante laborpostenojn kaj enspezojn.

Por antaŭsavi nian valoregan naturon ni volas signife plivastigi protektatajn areojn, certigi, ke ili ampleksu ŝlosilajn ekologiajn sistemojn, kaj garantii, ke la protektado vere funkciu. Pli granda ambicio estu ligata al plia financado. EU ludu rolon en la observigo de bazaj aranĝoj por sanaj medioj. Bazaj instalaĵoj kaj aliaj projektoj subvenciataj de eŭropa publika mono ne endanĝerigu biologian diversecon, sed prefere helpu savi kaj restaŭri ĝin tutmonde.

Ni alvokas por pli bone kontroli kaj pli severe puni nedaŭrigeblan kaj kontraŭleĝan arbofaligadon.

EU bezonas pli fortajn rimedojn por trakti senarbarigon rilate al importata nutraĵo kaj aliaj produktoj. Kaj eŭropaj grundoj estu protektataj kontraŭ degenerado kaj estu restaŭrataj, ankaŭ por pliigi ilian povon reteni malabundan akvon.

Ni volas plivastigi protektatajn marareojn al 20% de niaj maroj. Kontroloj pri sulfureligoj de ŝipoj estu pliigataj al ĉiuj marbordoj kaj peza bruloleo estu malpermesata en la arktaj kaj antarktaj regionoj.

**Cirkla ekonomio.** La bazo de nia nuna ekonomio estas preni rimedojn el la naturo, fari produktojn, uzi ilin kaj poste forĵeti ilin. Tiu lineara modelo estu anstataŭigata per cirkla ekonomio, kiu kreas plian valoron kaj uzas malpli da rimedoj, certigante, ke tio ne kondukas al pli danĝeraj substancoj. Anstataŭ daŭre konsumi pli da rimedoj ni bezonas konsumi pli saĝe kaj pli modere.

Ni volas, ke produktoj funkciu pli longe, kaj ke riparado estu plifaciligata, postulante, ke ili estu ripareblaj, kaj ke pliiĝu la daŭro de garantioj por kontraŭi planitan eksmodiĝon. Al kompanioj estu malpermesate forĵeti manĝeblan nutraĵon kiel rubon. Ne-reuzeblaj plastaĵoj estu impostataj aŭ malpermesataj; daŭrigeblaj alternativoj estu evoluigataj, kaj reutiligaj kaj reuzaj celoj estu starigataj. Ni ankaŭ alvokas por severaj limoj pri eksportado de rubo kaj por la enkonduko de impostoj pri elfoso kaj importo de krudaj materialoj.

**Terkultivado, nutraĵo kaj bestoj.** Nia maniero produkti kaj konsumi nutraĵon havas grandan influon sur nia sano, medio kaj bestoj. Ni volas reformi la komunan terkultivan politikon de Eŭropo ŝanĝante de industria terkultivado kaj genetike modifitaj organismoj (GMO-j) al daŭrigeblaj formoj de terkultivado, kiel biologiaj kaj ekologiaj terkutivadaj solvoj. Daŭrigebla terkultivado helpas malpliigi eligojn, savi abelojn, revivigi kamparajn areojn kaj teni nian nutraĵon sekura. Por protekti terkultivajn terenojn ni bezonas urĝe haltigi la urban disiĝon.

Ni volas redirekti la subvenciadon de terkultivado al daŭrigebla kultivado bazita sur justaj kaj rezultoligitaj kondiĉoj. Malutilaj pesticidoj, kia glifosato, estu malpermesataj. Komercaj reguloj ebligu al membroŝtatoj kompensi hejmajn produktantojn pro ekstraj kostoj kaŭzitaj de pli altaj mediaj normoj pri protektado de bestoj aŭ publika sano. Por informite elekti, homoj bezonas scii kion enhavas ilia nutraĵo, de kie ĝi venas kaj kiel ĝi estas produktita. Ni volas redukti viandokonsumadon favore al pli sanaj, pli daŭrigeblaj vegetaraj dietoj.

Fiŝkaptado en Eŭropo devas okazi inter daŭrigeblaj limoj. Sezonaj ĉesoj ebligantaj, ke fiŝrezervoj restabiliĝu, estu observataj de ĉiuj membroŝtatoj. Kontraŭleĝa fiŝkaptado estu haltigata, kaj importitaj fiŝoj estu konformaj al eŭropaj konservadaj normoj.

Ni ĉesigu profundmaran troladon kaj aliajn aparte detruajn formojn de industria fiŝkaptado kaj limigu la efikon de marfundokontakta fiŝkaptado sur ekologiaj sistemoj.

Bestoj rajtas vivi sen fitrakto, tial ni alvokas por malpermeso de peltobesta bredado, transporto de vivantaj bestoj dum longaj distancoj kaj testoj je bestoj. Brutbestoj sur bienoj devus havi garantion ke ili rajtas vivi laŭ sia natura konduto. Neniu publika mono subvenciu industri-similan tenadon de bestoj.

**Ekologia justeco.** Fundamente por agi por daŭrigebleco estas fortigi ekologian leĝaron kaj prefere

fortigi ĝin je ĉiuj niveloj - interalie iniciati proceson kontraŭ tiuj, kiuj rompas ĝin. La rajto ricevi informojn devas esti certigata, kaj aliro al ekologia justeco por civitanoj kaj civil-sociaj organizaĵoj plibonigata. EU devas produkti novan kaj ambician agado-programon por la natura medio. Ni ankaŭ alvokas por establi internacian tribunalon pri natur-medio, por trakti la plej gravajn malobservojn de internacia ekologia leĝaro.

Konservi la naturmedion ankaŭ estas socia tasko. Ekologia difektado ofte frapas misproporcie forte tiujn, kiuj vivas malfacile, ekzemple komunumoj kun malaltaj enspezoj kaj malriĉaj landoj - eĉ pli frapos estontajn generaciojn. Grandaj konstruprojektoj rajtas esti akceptataj post konvenaj konsultoj kun lokuloj. Ni reprezentas ekologian justecon.

La transiro al verda ekonomio ne bezonas tempon kaj ofte ĝi ne estos facile. Laboristoj kaj regionoj bezonas justan transiron al daŭrigeblaj vivtenoj. Speciala eŭropa plano devus esti starigata por financi re-trejnadon kaj ŝanĝi al novaj laborpostenoj, tiamaniere provizante socialan sekurecon kaj mildigante timojn.

**Dividita prospero en justa ekonomio kaj unio de solidareco**

*Ni volas konstruadi socian Eŭropon kun daŭripova ekonomio kaj imposto justeco. Ĉiu en Eŭropo devus havi la rajton je deca enspezo kaj bazaj publikaj servoj. Ni devas reformi la ekonomian sistemon tiel, ke ĝi laboras por la homoj kaj respektas la planedajn limojn. Verda Nova Interkonsento kanaligus miliardojn al daŭrigeblaj investoj kaj novigado. Dividante la profitojn de la ekonomio, ni povas teni ĉiun en la komunecon.*

Jardekoj da eŭropa kunlaboro sukcesis konstrui ekonomian union. Nun ni devas fari la sekvontan paŝon kaj fari ke EU servas al ĉiuj homoj. Ni devas certigi ke sociala justeco estas metita en la koron de nia Unio; ni devas konstruadi vere socian Eŭropon.

**Malriĉeco.** Hodiaŭ, kvarono de homoj en Eŭropo riskas malriĉecon kaj socian ekskludon - interalie 25 milionoj infanoj. Tio estas ne akceptebla. Dum tuta Eŭropo estas pli riĉa ol iam ajn, ĉiu meritas decan vivnivelon.

Redukti malriĉecon kaj pritrakti malegalecon devas esti fundamento de ĉiuj ekonomiaj kaj socialaj politikoj. Ni malakceptas rigorajn elspezreduktojn kiuj sekvigis pliiĝantan malriĉecon kaj malboniĝantajn publikajn servojn.

**Socialaj rajtoj.** Por realigi Eŭropan Kolonon de Socialaj Rajtoj ni postulas enkonduki eŭropan leĝaron kiu sekurigas adekvatan minimuman enspezo-sistemon en ĉiuj eŭropaj landoj. Ĉi tiu adekvata nivelo de sociala subteno estu provizata de Membroŝtatoj al ĉiuj homoj sen aliaj enspezo-fontoj, kiu orientiĝas al la lokaj vivniveloj kaj diferencoj en naciaj sistemoj kaj celas ekvivalentan protekton de ĉiuj civitanoj. Ekzistantaj normoj ne povas esti malaltigataj. Ni ankaŭ kredas ke aŭdacaj vizioj necesas, kiuj povus esti aprobitaj de studoj kaj elprovoj pri universala baza enspezo.

Eŭropo devas sekurigi por ĉiu esencajn socialajn rajtojn, kiel aliron al sanzorgo, loĝejoj kaj edukado. Publikaj investoj je socialaj, malmultekostaj kaj energi-efikaj loĝejoj devus esti subtenataj de eŭropaj fondusoj. Ni devas agi laŭ eŭropa versio cele al politiko por socialaj loĝejoj kaj protekti

kontraù ekspluatado tiujn, kiuj lu-prenas loĝejojn .

**Sano.** EU direktus Membroŝtatojn atingi universalan sanasekuron, redukti malegalecojn je san-servo kaj certigi aliron al medikamentoj. Ni volas pli fokusi al malebligo de fizikaj kaj mensaj sanproblemoj, ne nur trakti ilin.

Droga politiko devas baziĝi sur indikoj, ne antaŭjuĝoj. Eŭropaj ŝtatoj devus reformi drogo-politikojn kiu helpas, ne punas,  homojn kiuj suferas de narkotismo.

**Inkluzivo kaj koherado.** Eŭropo ne devu lasi iun malantaŭe - ĉu temas pri izolitaj aŭ malabunde loĝataj regionoj aŭ vundeblaj grupojn. Ni volas plifortigi teritorian koheradon reduktante regionajn malegalecojn kaj ene de kaj inter Membroŝtatoj, provizante homojn per egalaj ŝancoj sen konsidero de kie ili naskiĝis aŭ vivas.

Eŭropo devas okupi ĉefrolon ĉe plenumado de UN Konvencio pri la Rajtoj de Personoj kun Handikapoj, kaj interne kaj tutmonde. Ni volas fari infrastrukturon, transportadon kaj komunikadon alirebla. Handikapuloj devas esti inkluzivitaj en decidoj kiuj koncernas ilin, inkludante ke ili havas plenan aliron al voĉdonado.

**Laboro.** Laboro povas provizi enspezon, komunumon kaj montri vivocelon. Por krei kvalitajn laborpostenojn kaj prepari laborposteno-serĉantojn por tiuj, vasta gamo da aranĝoj necesas kaj de entreprenoj kaj de socio, retrejnado kaj pli-lernado, ĝis subteno por sociala entrepreneco kaj starigo da etskalaj entreprenoj.

Laborafera juro por ĉiuj estas fundamento de prospera kaj inkluziva socio. Ni aprobas la rajton de laboristoj organiziĝi en laborsindikatoj kaj ankaŭ kolektivan traktadon, socian dialogon kaj laboristan partoprenon.

Eŭropo devas ebligi kaj protekti la transliman movadon de laboristoj tiel, ke homoj ne falas tra naciaj fragmentitaj socialaj sistemoj. Eŭropa socialasekura numero kaj pli bona rekonado de profesioj faciligus labori en aliaj landoj. Ni volas protekti la rajtojn de migrintaj laboristoj kaj batali kontraŭ ĉiaj manieroj ekspluati laboristojn kaj kontraù trudita laboro en Eŭropo.

Ĉirkaŭ unu el dek de tiuj, kiuj havas laborpostenon riskas malriĉecon en Eŭropo. Ni volas ĝisdatigi laboro-regulojn kaj bonfarajn reĝimojn tiel, ke ili rekonas la ŝanĝiĝantan naturon de laboro, ankaŭ protektante memdungitajn homojn kaj laboristojn en la dumtempa kaj platforma ekonomio. Unu solvo povus esti senlaboreco-asekuro por la eŭrozono, kiu estu malferma al aliuloj kiu deziras partopreni, kiu garantias bazan enspezon, kun aldono de naciaj subvencioj por senlaboruloj.

Laboro vivo devas esti sekura, sana kaj justa. Laboro-rilata streĉo estas unu el la ĉefaj kaŭzoj de perditaj labortagoj kaj malsanaj laboristoj. Tial ni postulas pli bonan traktadon de psikosocialaj sanoriskoj en la EU-leĝdonado. Redukti kaj redistribui laborhorojn devus esti plifaciligate kiam laboristoj tion deziras - ekzemple, kiam gepatroj revenas al la laborejo post gepatraj paŭzoj. Ni ankaŭ deziras ke ĉiuj landoj sekurigas pagitan paŭzon por malsanaj laboristoj.

**Edukado, esplorado kaj kulturo.** Edukado estas ilo por homoj plibonigi siajn vivojn, kompreni la mondon kaj okupiĝi pri sia socio. Ĝi ankaŭ estas investo por la estonteco dum edukitaj kaj kvalifikitaj homoj estas la fundamento kaj de vigla ekonomio kaj funkcianta demokratio. Ni volas

fari Eŭropon la monda gvidanto en edukado kaj esplorado.

Nia longatempa vizio estas libera kaj alirebla edukado por ĉiuj por redukti edukadan malegalecon. Edukado ekipus homojn evoluigi la kompetentecojn kion oni bezonas por la verda informo-ekonomio. Ĉiu devus havi la okazon de dumviva lernado kaj karieraj ŝanĝiĝoj.

Eŭropo devas konstruiĝi sur scio kaj scienco. Ni volas forte pliigi financojn por sendependa esplorado kaj novigado cele al fronti sociajn defiojn, sekvante la sukceson de la programo Horizon 2020.

Ni ankaŭ alvokas por multobligi eŭropajn financojn por interŝanĝo de studentoj. La Erasmus+ interŝanĝo devas esti pli larĝigata kaj fortigata por vere ebligi homojn de ĉiuj labor-fonoj trejnadi aŭ studi en alia lando.

Viglaj artoj kaj kulturo estas gravaj kaj por la propra rajto kaj kiel fontoj de bonfarto, laborpostenoj kaj enspezoj. Ni aprobas kulturan diversecon, artisman liberecon kaj aliron al kulturo por ĉiu ajn.

Ni rekonas ke la multaj diversaj identecoj kiujn ni prezentas trans Eŭropo ludas gravan rolon por defendi demokration. Investo je kulturo povas krei novajn konektojn kaj tradiciojn; kunligante komunumojn kaj fortigante senton de apartenado. Ni kredas ke aliro al kulturo estas homa rajto. Kelkaj iniciatoj en la kultura kampo ekzistas ĉe la EU nivelo, kiel Creative Europe (Kreiva Eŭropo por subteni ekzemple film-kreadon) por kiu la buĝeto devus esti pliigata.

**Junularo.** Jarojn post la financa krizo, junaj Eŭropanoj ankoraŭ alfrontas nombron de defioj. En iuj landoj, senlaboreco ĉe gejunuloj altiĝas ĝis 40%. Multaj kompreneble sentas maltrankvilon pri la estonteco, atestante la senmovecon de ne-ŝanĝemaj politikistoj.

Ni staras kun gejunuloj, konstruante sociojn kie ili havas plenan aliron al sociala protekto kaj rajtoj, kiel loĝejoj, edukado kaj politika partopreno. Nia propono pri minimuma enspezo ankaŭ certigus pli bonan socialan asekuron por gejunuloj. Ni postulas kvalitajn laborpostenojn, malpermeson de diskriminaciaj salajroj por gejnuloj kaj konvenan pagon dum praktikaj staĝoj.

Youth Guarantee (Eŭropa Garantio por Junularo), kiu promesas al junuloj dungitecon, kontinuan edukadon, metilernadon aŭ praktikan staĝon ene de kvar monatoj post la fino de lerneja edukado, devas esti plenumata multe pli efike. La Garantio por Junularo devus esti deviga por ĉiuj Membroŝtatoj,farante la garantion al stabila, pagata kaj kvalita dungiteco sia prioritato. Sufiĉaj financoj por la volontula programo de la Eŭropa Solidareco-Korpuso (ESC) donus al gejunuloj la ŝancon kaj la monrimedojn evoluigi sian propran volontulan projekton.

**Maljunuloj.** La proporcio de grandaĝuloj kreskas rapide. Enkadre de la leĝo maljunaj Eŭropanoj havas multon por oferti,( pludonado de labor-sperto, volontulado en la civila socio), kio estus sekvata al ajna rekono. Neniu devus loĝi en malriĉeco pro la emeritiĝo.

Maljunaj laboristoj ankaŭ rajtus je dumviva lernado. Al homoj devus esti permesate emeritiĝi flekseble, ekzemple kombinante reduktitajn laborhorojn kun partatempaj pensioj. Ni devas batali antaŭjuĝon kaj diskriminacion kontraŭ maljunaj laboristoj.

**Ekonomio.** Plenumante la bezonojn de ĉiu , restante ene de planedaj ekologiaj limoj, ni devas

ĝisdatigi nian ekonomian sistemon. Alirado al vere nul-emisianta cirkla ekonomio provizos grandajn ŝancojn kaj por la homoj kaj por la medio.

Kapti la ŝancojn de ciferecigo, artefarita inteligenteco kaj robotigado - trakti iliajn defiojn kaj riskojn - povas plifortigi la Eŭropan ekonomion. Laboristoj frontante ĉi-tiun transiron devus esti subtenataj alkutimiĝi al tiu evoluiĝanta situacio.

Estas ankaŭ granda potencialo en la justa, sociala, kunlabora kaj prizorgo ekonomio. Novaj formoj de ekonomio povas kombini profitadon kun socia inkluzivo kaj demokrata estrado. Eŭropa reguligo ebligus alternativajn rimedojn, kiel kooperativoj, svarmfinancado kaj sociala entreprenemo.

Ĉiu devus havi aliron al dividitaj rimedoj - alinome “komunaĵoj“ - kiel pura aero kaj akvo, interreto aŭ scio. Komunumoj tra tuta Eŭropo devus esti instigataj evoluigi daŭrigeblajn kaj alireblajn alternativojn al la nunaj superregaj roloj de la merkata ekonomio kaj ties premgrupoj.

Malneta Nacia Enspezo sole estas neadekvata mezuro de ekonomia progreso. Ni volas kompletigi ĝin per alternativa rimedo kiu koncernas socialajn kaj ekologiajn temojn.

**Industrio kaj merkatoj.** Fabrikado estas kerna ekonomia motoro en la EU, provizante pli ol 100 milionojn rektajn kaj nerektajn laborpostenojn. Verda industria politiko celas al novigado kaj inteligentaj solvoj, kiu faras ke la produktoj kaj procezoj estos pli energio - kaj rimedo-efikaj.

Kompletigi la ununuran merkaton povas alporti laborpostenojn kaj prosperon, kiam ili estas kuplitaj kun ambiciaj komunaj reguloj protekti laboro-normojn, rajtojn de konsumantoj kaj kun publikaj servoj. Ekzistas precipe granda neĉerpita potencialo en cifereca kaj aliaj servoj sekurigante socialajn servojn kaj rajtojn por laboristoj kaj konsumantoj. Tutmondiĝo kreis tutmondajn kompaniojn neatingeblajn por naciaj rimedoj surbaze de dividitaj povoj (bridoj kaj kontraŭpezoj). Ni postulas efikan kaj sendependan EU-aŭtoritaton por kontroli la ciferecan sektoron por kontroli kaj limigi la merkatan potencon de grandaj kompanioj.

Malgrandaj kaj mezgrandaj entreprenoj (angle: SME, france PME-PMI) formas la spinon de la Eŭropa ekonomio. Ni penas instigi pli da homoj fariĝi entreprenistoj kaj subteni la nunajn, precipe entreprenistinoj, familiaj entreprenoj kaj migrintoj. Pli inteligenta reguligo certigus al MME-oj justan ludokampon kun grandaj firmaoj, kaj konkuro-reguligo devas esti reformita ĉi-konforme. Universitatoj devus esti instigataj kunlabori kun MME-oj esplori novigadojn. Ankaŭ gravas ke EU protektas Eŭropajn laborpostenojn kaj komercon kontraŭ maljusta prezoredukto de importaĵoj kaj kontraŭ eksterlandigo. Rekta eksterlanda investo ene de EU devas respekti sekurecon kaj publikan ordon.

Pli da daŭrigebla publika antaŭzorgo povas esti motoro verdigi la ekonomion. Ni volas pli sistemecan uzon de sociala, ekologia kaj justa-komercaj kriterioj kiam publikaj organizaĵoj aĉetas produktojn kaj servojn.

**Komerco.** La komercaj traktatoj – kiel ekz. CETA, Canada EU Trade Agreement, TTIP, Transatlantic Free Trade Agreement, kaj TISA, Trade in Service Agreement – ĝis nun estas grave difekthavaj. Sekrete negociite, ili neglektis koncernitecojn pri socialaj rajtoj, publikaj servoj kaj la vivmedio. Ni aparte rifuzas privilegiitajn rajtojn rilate al disput-aranĝoj por privataj investuloj, kiuj subfosas

demokration.

Ni daŭrigos labori por malfermitaj kaj justaj komercaj politikoj, kondiĉe, ke ili estas bazitaj sur internaciaj reguloj, travideblaj proceduroj, kaj ke ili plibonigas – ne endanĝerigas – la rajtojn de laboristoj, bienistoj kaj konsumantoj, bonfarton de bestoj kaj protekton de sano kaj de la vivmedio. Ni favoras progreson en la WTO (= World Trade Organization) kaj multflankajn interkonsentojn anstataŭ duflankajn komercajn aranĝojn. La Pariza Konvencio (2015 pri klimatoŝanĝiĝo), internaciaj labornormigaj reguloj kaj la Celoj pri Daŭripova Evoluigo devas formi la fundamentojn de komercaj traktatoj.

Eŭropo devas certigi, ke kompanioj plenumas altajn normojn ene de kaj ekstere de EU. La Unio kaj la Membroŝtatoj devas enkonduki regulojn por efektivigi la Gvidprincipojn pri Komerco kaj Homaj Rajtoj – kaj garantii la alireblon de la homoj al justeco, kaze ke kompanioj rompas ĉi regulojn. Nacioj samefekte laboru direkte al forta samcela internacia traktato. Multflankaj kompanioj estu devigataj praktiki la necesan diligenton tra la tuta produktĉeno por certigi, ke ilia komercado ne lezas homajn rajtojn kaj daŭripovan evoluigon.

**Impostoj.** Impostado povas esti forta ilo por honesteco kaj daŭripoveco. Ni advokatas ekologian impostreformon: imposti pli alte tion, de kio ni volas malmulte (konsumon de resursoj kaj poluadon) kaj imposti malpli alte tion, de kio ni volas pli multe (laborlokoj). Eŭropo postulu al la membroŝtatoj plialtigi impostojn je fosiliaj fueloj kaj konsideri eŭroponivele vivmediajn impostojn, ekz. je flugoj kaj plastoj.

Tro ofte malriĉuloj devas pagi proporcie pli altajn impostojn ol la riĉaj, kaj malgrandaj entreprenistoj pli multe ol grandaj korporacioj. Eŭropo devas fermi la evitilojn kiuj permesas al la multhavuloj eviti impostojn, egaligi la agoliberon kaj helpi financi neprajn publikajn investojn.

Estas aparte grave batali impostofraŭdon kaj monolavadon, kiu helpas financi organizitan krimon. Ni petas plifortigi regulojn kontraŭ monolavado kaj fortigi Eŭropajn povojn pri leĝa persekutado.

Por establi impostojustecon Eŭropo devas adopti pli severajn rimedojn por malfermi impostohavenojn, batali imposteskapon kaj imposteviton, kaj ekstere kaj interne de la Unio. Pli da harmoniigo pri tio kio estas impostata kaj ĉi-celaj metodoj, io kiel forta komuna solidara korporacia impostbazo (KSKIB) por grandaj kompanioj kaj minimuma korporacia impostokvoto, reduktus la damaĝan konkuradon inter Membroŝtatoj. Transe de sin-devontigo al ĉi kadro, la Membroŝtatoj retenu la povon trakti imanentajn malavantaĝojn en siaj ekonomioj. Inverse, avantaĝoj kiuj rezultas de la reduktado de impostevito, estu uzataj por Eŭropaj investoj por malkreskigi socialan malegalecon kaj subteni malavantaĝigitajn kaj periferiajn komunumojn. Devas esti fortigataj la devigoj por multinaciaj kompanioj publike raporti pri tio, kie ili pagas siajn impostojn.

Impostado devas esti taŭga por nia tutmondigita ekonomio. Ni devas enkonduki pli severajn rimedojn por batali merkatomanipuladon, misuzan spekulaciadon kaj internulan komercadon kaj devas plibonigi travideblecon en la financaj merkatoj. Ni proponas financ-transakcian imposton por limigi spekulaciadon kaj financi daŭripovajn investojn. Eŭropa ankaŭ devas trovi honestan kaj funkcian vojon imposti diĝitajn servojn kaj trakti kriptovalutojn.

**Financaj merkatoj kaj investoj**

Por sekurigi financan stabilecon kaj preventi futurajn krizojn ni devas pritrakti sistemrilatajn riskojn kaj haltigi financajn instituciojn iĝi tiom grandaj ke bankroto indus neebla. Bankoj bezonas pli altajn kapital-stokojn kaj por la realekonomio esenca bankado devas esti apartigata de spekulacia komerco. Eŭropo bezonas pli severan financan reguladon por certigi, ke la financa sektoro plene kontribuas al fortika kaj daŭripova ekonomio.

Eŭropaj ekonomiaj reguloj devas kuraĝigi, ne malhelpi responsajn socialajn investojn. Plibonigi infanprizorgadon, fundamentan edukadon, pliklerigon de laboristoj kaj kosto-porteblan loĝadon helpos al ĉiuj altigi dungitecon kaj redukti socialan malegalecon. Al ĉiuj estu garantiata alireblo al bazaj financaj servoj.

Fari la necesan ŝanĝon al daŭripova ekonomio postulos grandajn investojn. Ni proponas ampleksan Verdan Novan Konsenton por financi kaj direkti investojn en kampojn kiel translimaj fervojaj konektoj, renovigeblaj energioj, daŭripovaj novigoj kaj justa transiĝo, aparte en la pli malriĉaj Membroŝtatoj.

**Popolpotenco kaj respekto reciproka en diversa kaj feminista Eŭropo**

*Eŭropo estas unio konstruita sur komunaj valoroj. EU devas batali por egalaj rajtoj por ĉiuj kaj kontraŭ ĉia diskriminacio. Ĉiu unuopulo havas la rajton je ekzisto kaj je kredo kaj amo je kio ajn. Ni volas krei feminisman kaj inkluzivan Union, kiu alte taksas genran egalecon, homajn rajtojn, demokration kaj diversecon. Eŭropo devas esti forta tutmonda voĉo por solidareco, homa evoluo kaj paco.*

Demokratio, la regado de la juro kaj de homaj rajtoj estis pli kaj pli defiataj ene de Eŭropo kaj internacie. En ĉi afliktemaj tempoj Eŭropo povas esti lumturo de espero. La Unio devas ludi pli fortan rolon rilate defendon kaj pliprofundigon de la fundamentoj de malfermitaj socioj. Ni deziras viglan demokration je ĉiuj niveloj: de la surloka al la regiona, nacia, Eŭropa kaj internacia.

**Demokratio kaj civilaj rajtoj.** Ni volas subteni la civil-socion cele al defendado kaj pliprofundigado de demokratio, la regado de juro kaj de homaj rajtoj. Eŭropo bezonas ankaŭ plialtigi sian kapaciton sin defendi kontraŭ sintrudoj/ intervenoj de ekstere, kiel provoj influi elektojn, disvastigi malinformojn kaj incendi kaj nutri malamon. Tamen, ĉi paŝoj ne konduku al malfortiĝo de aliaj rajtoj.

Demokratio povas bone funkcii nur se ĝi estas apogita de libera parolo kaj sendependaj amaskomunikiloj. Ni volas altigi la subtenon de esploriva ĵurnalismo kaj subteni minacatajn ĵurnalistojn. Malkaŝuloj – homoj, konatigantaj informojn de publika intereso – devas esti vigle protektataj.

En pliiĝe diĝita mondo la enreta protektado de libereco kaj homaj rajtoj iĝas pli grava. Ni defendas la neŭtralecon de la reto – la principon, ke ĉiuj datenoj devas esti egale traktataj – kiel fundamenton de malfermita interreto. La lastatempe enkondukitaj Eŭropaj datenprotektaj reguloj devas esti plene efektivigataj. Dekomence bazaj aranĝoj estu kunmetataj laŭ tio, ke ili liveras la plej bonan protekton kaj sekurecon de la datenoj. Elektronika komunikado devas esti ek-al-fine kodigita. Ni forte rifuzas ajnan formon de datenstokado sen-kialan.

La protektado de homa digno postulas, ke ni limigas la delegadon de gravaj decidoj pri nia vivo al algoritmoj. Homoj estu komandopovaj pri la aranĝoj de algoritmoj kaj robotoj. Algoritmoj devas esti malfermitaj al publika kontrolo kaj liberaj de diskriminacio. Eŭropo devas ludi pli gravan rolon en la formado de internaciaj reguloj.

Ni proponas, ke la aĝo je balotado kaj kandidatiĝo por Eŭropaj elektoj estu 16 jaroj. Tio donus al la junularo pli fortan voĉon fari decidojn, kiuj formas nian komunan futuron. Ni ankaŭ postulas plibonigadon de la civila edukado ene kaj ekstere de la lernejoj.

**Travidebleco kaj partoprenigo.** Ni deziras altigi radikale la travideblecon de la Eŭropaj institucioj, inklude de la Eŭropa Centra Banko. Civitanoj havas la rajton scii kiel decidoj estas farataj kaj kiel ilia mono estas elspezata. Ĉiuj pozicioj de la membroj de la Konsilantaro estu publikigataj. Ni volas devigan piedprem-signon de la leĝdonado koncerne EU-leĝojn, devigan lobiregistron por ĉiuj EU-institucioj kaj fermon de la rotaciantaj pordoj inter politiko kaj la granda entreprenaro pere de intertempaj fazoj. Ĉi tiuj reguloj de travidebleco kaj etiko estu kontrolataj de sendependa institucio je EU-nivelo. Decidoj devas esti bazitaj sur la plej bona evidento kaj laŭ-fakta konsultado kun la interesatoj.

La Iniciativo de Eŭropaj Civitanoj estas bonvena mekanismo por engaĝigi homojn kadre de Eŭropa decidofarado. Tamen, ĝia promeso ne plene materialiĝis pro la burokrataj obstakloj kaj malgranda politika subteno flanke de la Eŭropa Komisio. La proceduro estu simpligata, kaj devus esti eble por civitanoj proponi reformojn de la EU-traktatoj. la reguloj devas esti ankaŭ plibonigataj tiel, ke tiaj iniciativoj ricevas respondon kaj kondukas al konkreta agado.

**Feminismo kaj genra egaleco.** Per la aktuala rapido al atingo de genra egaleco en Eŭropo ankoraŭ daŭrus pli ol 70 jaroj atingi egalajn salajrojn, 40 jaroj ĝis domomastrumado estas egale dividataj kaj 20 jaroj por atingi egalan prezentadon en la politiko. Ni ne volas atendi tiom longe.

Genra egaleco estas kerna afero de Verda politiko. Ni volas fortajn leĝojn pri egalaj salajroj por egala laboro. Ĉar virinoj en Eŭropo ankoraŭ faras ĉirkaŭ du trionojn de la nepagita hejma laboro, gepatra libertempo devas esti plilongigata kaj distribuata pli egale inter la gepatroj. Ni volas oferti pli bonan protektadon de gravedaj laboristinoj. Ni postulas ankaŭ realan plibonigon de atingebla kaj pagebla altkvalita prizorgado de infanoj.

Genrokvotoj en la estraroj de grandaj kompanioj kaj egaleco en la plenum-komitatoj de EU-institucioj helpus pli bone prezenti virinojn koncerne decidofaradon. Por atingi egalecon en Eŭropo homoj de diversaj genroj devas profiti egale de la EU buĝeto.

Ni batalas por partoprenigo kaj memdeterminado de la virinoj. Eŭropanoj havas konsternige malegalan aliron al sekso- kaj regeneriĝo-koncernaj sano kaj rajtoj. Ni postulas garantiitan liberan kaj atingeblan, bonkvalitan kaj sekuran sanprizorgadon kaj servojn koncerne sekson kaj regeneriĝon, inklude de aborto. La rajto de la virinoj decidi pri aborto devas esti fortigata –speciale kie ĝi estas aparte limigata. Informado pri kontraŭkoncipo kaj aborto* estu facile atingebla en ĉiuj landoj.

*) Alternattiva Demokratika Malta notis la kontraŭon al ĉiuj referencoj pri aborto.

Eŭropo devas vere batali genrobazitan perforton. Ĉiuj landoj de Eŭropo devas efektivigi la Konvencion de Istanbul kiel prioritatan aferon.

**Diverseco.** Ni fieras, ke Eŭropo diversas kaj buntas. Ni forte kondamnas kaj batalas ĉiun specon de diskriminacio kaj malamas krimojn surbaze de - sed ne nur limigita al - genro kaj seksa identeco, klaso, etno kaj ties subdividoj. Ni volas, ke ĉiuj politikoj kaj servoj agnoskas la realan diversecon de homoj kaj iliaj familioj – kaj la kontribuojn, kiujn ili faras al niaj socioj.

Homoj, kiuj apartenas al seksaj kaj genraj minoritatoj (LGBTIK = Lesba, Geja, Bi, Trans, Interseksa, Kvera sence de miksaĵo inter LGBTI; angle LGBTIQ = Lesbian, Gay, Bi, Trans, Intersex, Queer), ĝuu egalajn rajtojn en tuta Eŭropo. Interrilatoj de samseksaj paroj kaj ties familioj estu egale agnoskataj kaj la libereco pri movado de ĉielarkaj familioj sekurigataj. Homoj havu la rajton determini sian genran identon kaj esprimon, inklude havi aliron al laŭleĝa genra agnosko. Ni forte malakceptas la devigan sterilizadon de transhomoj.

**Migrado kaj fuĝintoj.** Homoj ĉiam migradis kaj migrados pro variaj kialoj. Ni devas certigi, ke ĉiuj migrantoj estas traktataj kun digno kaj koncerno pri siaj homaj rajtoj. Konstrui murojn ne estas opcio, nek la akceptemo ke la Mediteraneo iĝu amastombejo. Kiam novalvenintaj migruloj trovas lokon en niaj socioj, ili povas kontribui kaj al nia ekonomio kaj al nia kulturo.

Estas urĝa bezono trovi justan alternativon por la aktuala Dublin-sistemo, kiu responsigas la Membroŝtatojn je la EU-limo pri la fuĝintoj. Ni laboras por komunaj normoj kaj reguloj pri labor-movebleco kaj migrado kaj por kune porti la responsecon egale por ĉiuj landoj en spirito de solidareco. Kontroloj ĉe la limoj devas certigi, ke homoj, bezonantaj helpon, povas efikece registriĝi kiel azilpetantoj, inkluzive de atingeblo al azilproceduroj, en akordo kun la leĝoj. Ili devas esti registrataj juste kaj distribuataj juste al la EU-Membroŝtatoj. Familiaj kaj ali-tipaj gravaj ligiloj al iu Membroŝtato devas esti konsiderataj. Ni ankaŭ volas enkonduki relokigaj kaj homamajn vizojn por fuĝintoj al triaj landoj.

Ni volas, ke la Unio subtenas landojn, regionojn kaj urbojn, kiuj bonvenigas grandan nombron da fuĝintoj kaj migrantoj. Helpi azilpetantojn neniam estu krimigate, anstataŭe EU apogu savactivecojn. Homoj ne estu enprizonigataj nur pro tio, ĉar ili petas azilon. Al azilpetantoj estu garantiata aliro al jura helpo.

La Eŭropa Parlamento havu demokratian gardadopovon pri la efektivigo de limkontroloj, pri formalaj kaj neformalaj interkonsentoj kun triaj landoj kaj azilo- kaj migradopolitikoj. Ni rifuzas ajnajn planojn por kontrolataj centroj aŭ regionaj foriro-platformoj ekstere de EU.

Eŭropo devas establi laŭleĝajn kaj sekurajn koridorojn de migrado. Ni ankaŭ devas labori pli bone pri provizado de eblecoj por novalvenintoj. Agnoski la spertojn, lernitajn en la devena lando, peradi lingvotrejnadon kaj batali rasismon povas helpi integradi la novalvenintojn en la labormerkaton. Fundamente al ĉiuj agadoj estas respekto pri diverseco, diferencaj kulturoj kaj lingvoj. Inter-konsentoj kun transitlandoj estu reviziataj por certigi la ĝustan protektadon de homaj rajtoj kaj la internaciaj devoligoj de EU.

**Internacia solidareco.** Eŭropo ĉiam konfirmis plurflankismon kaj faros tiel. Ni havas respondecon defendi niajn valorojn internacie. Natura platformo por tio estas la Unuiĝintaj Nacioj. Eŭropo devus

kaj defendi UN kontraŭ atakoj kaj rekomendi por reformoj, kiu inkludas plibonigantan travideblon, respondigeblecon kaj efikecon.

Eŭropo devas pliigi financojn por internacia evoluado kaj homhelpa agado. Membroŝtatoj asignus almenaŭ 0.7% de sia ekonomio por subteni bezonulojn eksterlande, kun forta emfazo pri la plej malriĉaj landoj kaj la plej vundeblaj homoj.

La Celoj por Daŭripova Evoluo provizas bonan projekton por EU aktivecoj ankaŭ eksterlande. Ni volas kunordigi internacian evoluadon pli bone inter  EU kaj Membroŝtatoj, evitante duoblan laboron kaj reduktante malŝparon da rimedoj.

Aktuale, multaj EU politikoj insidas la bonan laboron de la Unio pri internacia evoluado. Male, politikoj pri, ekzemple komerco, la fiŝkapta industrio kaj migrado devas subteni la celojn por evoluado kaj daŭrigebleco, deklarita kiel politika kohereco. Tiel, ni ankaŭ pritraktas la fundamentajn kaŭzojn de trudita migrado.

Eŭropo havas apartan intereson kaj respondecon en nia najbareco, kaj en la orienta kaj en la suda. Ni klopodas por ebligi la aliĝon de okcidentaj balkanaj landoj, surbaze de Eŭropaj valoroj. Ni ankaŭ deziras profundigi kunlaboron kun orientaj partneroj. Por ni, kiuj antaŭenigas altajn normojn de demokratio, la principo de la jurŝtato kaj homaj rajtoj estas prioritato por kunlaboro kaj monhelpo.

**Paco kaj sekureco.** Eŭropa Unio estis kore paco-projekto - helpante konservi la pacon estas natura rolo por Eŭropo en la mondo.

Homa sekureco estas multe pli larĝa ol la manko da perforto. Eŭropo devas trakti la diversajn minacantajn sekurecajn defiojn, de falsa propagando  kaj energio-dependeco de malamikaj landoj, mafiismo kaj ekstrema vetero kaŭzita de klimato-ŝanĝiĝo. Reduktante malegalecojn, protektante la natur-medion kaj fortigante demokration estas daŭrigeblaj manieroj kontraŭi fundamentajn kaŭzojn de perfortaj minacoj kaj por konstruadi eltenemajn sociojn.

Eŭropo devas esti multe pli aktiva trovante pacajn solvojn kontraŭ armitaj konfliktoj kaj en nia najbareco kaj preter tio. Ni volas investi multe en civila konfliktopreventado, mediacioperado ?, repacigo kaj interpacigaj agadoj. Trakti la fundamentajn kaŭzojn de konfliktoj estas pli facile, malpli koste kaj pli humane ol pritrakti la malbonajn sekvon. Ni malakceptas direkti Eŭropajn financojn al militaraj celoj. Daŭranta sekureco kaj stabileco ne povas esti konstruataj surbaze de armiloj.

Ni alvokas por haltigi armilo-eksportojn al diktatoroj kaj interbatalantoj. Eŭropo devus aktive labori por internacia senarmiĝo, inkludante malpermesi atomarmilojn kaj mortigo-robotojn.

EU -landoj devas helpi kaj asisti al tiuj Membroŝtatoj kiu estas viktimoj de armita agreso. Por konservi la pacon, Eŭropo ankaŭ bezonas komunan politikon pri sekureco kaj defendo. Defendo povas esti kaj pli efika kaj pli malmultekosta je kunlaborado kaj dividado da rimedoj kaj ankaŭ kunordigante la strebojn de Membroŝtatoj je Eŭropa nivelo.

Eŭropo devas reagi forte krimojn kontraŭ la homaro. Tamen, armeaj intervenoj povas esti senescepte nur la lasta rimedo. Iu ajn komuna milita operacio devas esti surbaze de longatempa politika strategio, observante la internacian juron kaj devas havi aprobon de la Eŭropa Parlamento.

Vivi sen perforto ankaŭ estas fundamenta rajto ene de Eŭropo. EU kaj naciaj aŭtoritatoj devas labori kune pli forte kaj bone por malhelpi kaj batali terorismon. La Unio povas provizi financojn por batali radikaligon, dum pli striktaj reguloj pri armiloj kaj municioj povas redukti pafilo-perforton.

**Pli proksima unio: reformi EU-on prepari al estonteco.**

*Eŭropa Unio bezonas ĝisdatigon. Ni penas fari EU pli travidebla, demokrata, efikeca kaj efika. Ni laboras por reformi instituciojn kaj strukturojn konstruadi pli fortikan Union kiu povas rekonektiĝi kun civitanoj. Ni volas konstruadi pli fortan Eŭropon kiu plenumas sian plenan potencialon plibonigi la vivojn de homoj kaj pritrakti ĉiujn defiojn, kiujn la estonteco povus alporti.*

**Estonteco de Eŭropo.** EU devas esti evoluigata al plena supernacia demokratio en kiu publikaj decidoj estas faritaj travideble de elektitaj kaj politike respondecaj reprezentantoj. Kontraŭstaro de kelkaj Membroŝtatoj ne malhelpu la plejmulton antaŭeniri. Tial la postulo al unuanimeco ĝenerale estu anstataŭigata per normala leĝdona procedo kaj simpligita plibonigita kunlaboro. La Eŭropa Parlamento devas havi la potencon iniciati leĝon kaj uzi sian kun-decidon kaj ekzamenado-rajtojn en ĉiuj sferoj.

Ni firme kredas ke EU devus esti kun-tenata ene de la sama kadro. EU- institucioj devus ne esti sudividataj aŭ reproduktataj. Ni kontraŭas la kreadon de novaj institucioj nur por nova Eŭro–zono, male subtenas establi specialan Eŭrozono-komitaton ene de la Eŭropa Parlamento.

Pliaj paŝoj devas iri al „ĉiam pli intima Unio". Multe povas esti farata ene de la nunaj traktatoj: ni aprobas aŭ parlamentan kunvenon malferman al la civila socio, aŭ asembleon da balotantoj*, kun mandato kune decidita de la Eŭropa Parlamento kaj reprezentantoj de Membroŝtato agantaj laŭ kvalifikita plimulto. La fina decido fari ŝanĝojn de la traktato devus esti farata pere de Unio-larĝa referendumo de Eŭropaj civitanoj. Ni ne volas vetoojn de individuaj Membroŝtatoj kiuj povus bari tian decidon.

Ni aprobas demokratan estontecon por Eŭropo, kie regionaj kaj naciaj specifecoj estas reprezentataj je la sama bazo kun la ĝenerala intereso de EU. Tial ni proponas sistemon de komuna leĝdonado en kiu la Eŭropa Parlamento, kiu reprezentas la EU -civitanojn entute kaj krome enhavas elektitojn surbaze de transnaciaj listoj, decidas kune kun ĉambro da reprezentantaj Membroŝtatoj. Regionoj estas reprezentataj en fortigita Komitato de la Regionoj.

**Buĝeta kaj financa politiko.** EU bezonas multe pli ambician kaj efikan buĝeton por plenumi siajn taskojn, kun-deciditajn de la Eŭropa Parlamento. Tiu pliigo devus esti financita grandparte de propraj rimedoj surbaze de impostoj je poluado kaj uzado de resursoj. La buĝeto ankaŭ devas esti kompletigita kun obligacioj por financi projektojn de ĝenerala intereso. La Unio ankaŭ povus esplori partoprenan buĝeton, ebligante ke la popolo havu rektan diron kiamaniere parto de ilia mono estos uzata.

Post La Briteliro, la Eŭro-zono reprezentos ĉirkau kvar kvinonoj de EU civitanoj kaj pli ol kvar-kvinonoj de la ekonomio. Niaj proponoj pri estontaj bezonoj de la mona unio koncernas la Eŭro-zonajn landojn. La Eŭro-zono devas havi fiskan kapaciton kiu ankaŭ estas malferma al ne-Eŭro-zonaj Membroŝtatoj, kaj ĝiaj membroj nepre povu zorgi por kunordigaj kaj solidarecaj mekanismoj. Tiaj iloj, kiel Eŭro-obligacioj, subtenante estonteco-orientigitajn kaj daŭrigeblajn investojn devus

esti preparitaj surbaze de socialaj kaj ekonomiaj kriterioj.

Malakceptante ne sukcesajn politikojn de elspezreduktoj, ni volas sociajn kaj ekologiajn celojn surbaze de egaleco kun la buĝetaj celoj de ĝisdatigita kaj reformulita Pakto pri Stabileco kaj Kreskado. Ĉi tiu Pakto ankaŭ estu kompletigata per Pakto pri Daŭrigebleco kaj Prospero, kiu difinas socialajn, ekonomiajn kaj ekologiajn celojn surbaze de indikiloj por la Eŭropa Mona Unio (EMU) kaj ĝiaj membroŝtatoj.

La interregistaraj strukturoj de la Eŭro-zono, kiel la Fiska Kompakto (la fiska parto de la EU-konstitucio) kaj Eŭropa Stabileco Mekanismo (ESM), devas esti profunde reformataj kaj integritaj en la juran kadron de EU kun la plena inkludigo de la Eŭropa Parlamento. La Eŭro-grupo (financ-ministroj de la Eŭro-zono) devas fariĝi normala parto de la EU-Konsilio. La banka unio devas esti kompletigata kun funkcianta EU kredit-asekura skemo. La statutoj de la Centra Banko de Eŭropo devas esti reviziataj por ebligi ĝin agi kiel sole restanta pruntisto por Membroŝtatoj kaj provizi intertempan trankviliĝon dum merkato-krizo de registaraj obligacioj, kaj subteni plenan dungitecon, krom prezo-stabiligo. La kondiĉoj por trankviliĝo devas esti difinitaj de demokratie respondigeblaj leĝdonantoj ĉe la rilataj niveloj.

**Fundamentaj rajtoj kaj migrado reformo.** La amplekso de la Ĉarto de Fundamentaj Rajtoj devus esti vastigata por validi rekte en ĉiuj sferoj kaj Membroŝtatoj, kaj ĝia kapacito plibonigita por pli efike defendi individuajn civitanojn. Ni volas ke la rajto je abortigo estu enkondukata en la Ĉarton de Fundamentaj Rajtoj. EU devas akceli sian aliĝon al la Eŭropa Konvencio pri Homaj Rajtoj (ECHR) kaj Membroŝtatoj sian aliĝon al la EU prokuroro. Homoj kaj organizaĵoj devus havi aliron al la Eŭropa Tribunalo de Justico kiam rekte trafitaj pere de vundigo flanke de Membroŝtato aŭ EU institucio.

La Unio devas uzi pli fortajn ilojn - interalie iniciati leĝan proceson - por interveni kiam bazaj Eŭropaj valoroj estas subfosataj. Ni vokas al deviga kaj ampleksa mekanismo por monitori la staton de demokratio, la principo de la jurŝtato kaj fundamentaj rajtoj en Membroŝtatoj. Ĉi tiu devus esti kompletigita per politika dialogo, rapida interveno se okazus gravaj malobservoj kaj, se necese, adekvata sankcio. Kie la principo de la jurŝtato ne estas garantiita, Eŭropa financado povus preterpasi naciajn registarojn por rekte provizi municipajn administraciojn kaj organizaĵojn. Ni volas establi instrumenton pri Eŭropaj valoroj por subteni la civilan socion kaj antaŭenigi kernajn valorojn ene de la EU. Ni volas draste pli bonan institucian regadon super EU-fondusoj por malhelpi korupton.

**Pli inteligenta reguligo kaj daŭripova evoluo.** Pli bona kaj pli inteligenta reguligo povas redukti nenecesan burokratismon kaj fari vivojn pli facilaj. Reguligo enkalkulu la diversajn kapacitojn de malgrandaj kaj mezgrandaj entreprenoj. Tamen, tio devas ne estu kvazaŭ fuma-ekrano por malreguligi kaj retropuŝi necesan protekton por homoj kaj la medio.

La Agendo 2030 por Daŭripova Evoluo lumigas ke la defioj kiujn ni alfrontas estas universalaj kaj interligitaj. La Celoj por Daŭripova Evoluo devas esti enmetitaj trans ĉiuj internaj kaj eksteraj EU-politikoj. La Unio adoptu altnivelan efektivigo-strategion kiu identigas kaj traktas la mankojn en nunaj politikoj.

**Karaj voĉdonantoj,** la venonta elektado estos decida por la estonteco de Eŭropo. Ni volas superi la antaŭstaton kaj malfermi novan libron por nia komuna eŭropa klopodo. La mondo ĉirkaŭ ni ne staras senmove kaj ni, en Eŭropo, ne rajtas malŝpari tempon. Eŭropaj Verduloj promesas batali por la politikoj kiujn ni prezentas vin ĉi tie. Se vi elektas Verdulojn – el pli da landoj - al la Eŭropa Parlamento, tio helpos nin antaŭenpaŝigi laŭ ĉi tiu Manifesto.

**Ni invitas ĉiujn Eŭropajn civitanojn subteni nin en ĉi tiuj bataloj.**

*En kazo de enhavaj diferencoj validas la angla originalo*

Manifesto adoptita de EGP Konsilio, Berlino, 23 - 25 Novembro 2018

(traduko de Asocio de Verduloj Esperantistaj: Leo de Cooman, Dr. Wolfgang Günther, Dr. Manfred Westermayer – subtenita de traduku.net; korektita de Reneé Triolle; trovebla je: verduloj.org > Verda Politiko )